

CxEA Retkomunikoj 5/2002:

Enhavo:

1. NOVAJ GVIDORGANOJ DE CxEA
2. NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE CxEA
3. NOVA REDAKTOKOMISIONO
4. EK AL LA UK EN GOTEGORGON
5. BIBLIOTEKO DE CxEA SERVU AL CxEA-MEMBROJ

1. Novaj gvidorganoj de Cxehxa Esperanto-Asocio

Dum la 10-a kongreso de CxEA okazinta 2002-11-15/17 en Prago kune kun la festeno omagxe de centjarigxo de Klubo de Esperantistoj en Prago estis elektitaj novaj gvidorganoj de CxEA jene:

Komitato de CxEA:

Věra Podhradská - prezidanto, Lucie Karešová - vicprezidanto, Petro Chrdle - vicprezidanto, Pavel Polnický - sekretario, Jindřich Ondráček - kasisto, Libuše Dvořáková - respondeculo pri kluboj Jiří Tomeček - respondeculo pri sekcioj

Kontrola grupo: Josef Hron - prezidanto, membroj Věra Šlahařová kaj Jiří Souček

2. Novaj honoraj membroj de CxEA:  
dum la kongreso estis asignitaj ankaux titoloj honoraj membroj de CxEA al niaj novaj 6 samideanoj, kiuj havas eksterordinalajn meritojn pri la evoluo de Esperanto-movado. Jen ili (lauxalfabete): Zdeněk Hršel el Brno, Jiří Patera el Praha, Miloslav Pastrňák el Havířov, Jiří Pištora el Česká Třebová, Věra Podhradská el Brno kaj Miroslav Smyčka el Ústí nad Labem. La priskribon de iliaj meritoj vi povos legi en Starto 4/2002, kiu gxuse nun estas prespreta kaj baldaux gxi atingos vin. Al cxiuj cxi ni kore gratulas kaj deziras al ili firman sanon por povi plu servi al la Esperanto-movado.

3. Nova redaktokomisiono de CxEA-retkomunikoj:

Post la elekto de novaj gvidorganoj estas ankaux nova elektokomisiono, kiu konsistas el jenaj membroj:

a) cxiuj rete atingeblaj komitatanoj (cxiuj menciitaj sub 1. krom J. Ondráček), b) prezidanto de la kontrila grupo J. Hron, c) prezidantino de pedagogia sekcio kaj cxehxa ILEI-sekcio J. Melichárková, d) redaktoro de organo de CxEA Starto M. Malovec, e) gvidanto de la libroservo kaj biblioteko de CxEA Zdenek Pluhar Cxiu numero de retkomunikoj estas dissendata une al cxiuj membroj de la redaktokomisiono intervencele, do la informoj kiujn vi legas cxi tie vere reprezentas Cxehxan Esperanto-Asocion.

4. Ek al la Universala kongreso en Goteburgon.

Ni rememorigas la interesatoj por la partopreno de UK, ke UEA-peranto

por Cxehxio estas kongresa kaj kleriga agentejo de Petro Chrdle KAVA-PECH, kiu:

- informas pri UK kaj kolektas aligxilojn kaj pagojn en cxehxaj kronoj
  - peras cxiujn mendojn rilate la kongreson (tranoktojn, ekskursojn, bankedon kaj la ceterajn)
  - komisite de CxEA organizos por la membroj de CxEA (kaj eventualaj gastoj) flugkaravanon de Prago, kiu forflugos la 27-an de julio 2003
- Pliajn informojn vi povas ricevi cxe [chrde@kava-pech.cz](mailto:chrde@kava-pech.cz)  
Bv. ne tro heziti, cxar la limdato por la plej favora kongreskotizo estas la 27-an de decembro (gxis la fino de decembro estas limdato de UEA - aldono por tiuj, kiuj volas pagi rekte al UEA).

5. Ekde nun jam denove servas biblioteko de CxEA (kiu originas de la biblioteko de la Scienceknika sekcio de CxEA) al siaj membroj. La pruntkondicxojn eblos legi en la numero 4 de cxijara Starto, ni nun diru, ke gxin prizorgas Zdenek Pluhar ([m.pluharova@worldonline.cz](mailto:m.pluharova@worldonline.cz)) kaj ke elprunto de libroj eblos nur perposxte kaj nur al la membroj de CxEA. □ □